N. N. 18,

Adiaŭ

tradukita de Jan van Schoor

Por nin disigi venas
jam lasta la moment'
al paradiz' de ĝojo
reiru do sen plend'!

Liberon povas milde
donaci ja la mort';
al nova vivo iru
kaj al pli bona sort'!

Ne daŭros longe: baldaŭ
mi ĉe vi estos jam;
mi ĉi malsupre dume
memoros vin kun am'!

De nova tag' mateno
aperos, amatin':
ĝi, for de teraj zorgoj,
eterne ligos nin!

Traduko de la Germana poemo "Lebewohl" de N. N. 18 en Esperanton de Jan van Schoor .

Arg-499-976 (2009-11-29 02:01:55)

Fonto de tiu ĉi Esperantigo: `http://www.literaturo.dk/lebewohl.htm`. S-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK 4640 Fakse. Danujo), kiu verkis la retejon `www.literaturo.dk`, trovis la tradukon en la revuo "Heroldo de Esperanto", Köln. N-ro 20/21 (829/830). 19/26-an de majo 1935. [La retadreso de s-ro Lars Kromann estas: `lars.kromann@mail.dk`].

N. N. 18,

Adieu

tradukita de N. N. 19

Adieu! 'tis love's last greeting,
The parting hour is come!
And fast thy soul is fleeting
To seek its starry home.

Adieu! go thou before me,
To join the seraph throng!
A secret sense comes o'er me,
I tarry here not long!

Adieu! there come a morrow,
To ev'ry day of pain!
On earth we part in sorrow,
To meet in bliss again!
Ameet in bliss again!

Traduko de la Germana poemo "Lebewohl" de N. N. 18 en la Anglan de N. N. 19.

Arg-499-977 (2009-11-30 15:06:07)

Tiu ĉi angligo troviĝas en la retejo `http://www.cpdl.org/wiki/index.php/dieu!_'Tis_Love's_Last_Greeting_(Franz_Schubert)`. Ne estas indikite tie, kiu verkis tiun ĉi tradukon en la anglan.